



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 9-a de Januaro 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Gabi Zeevi. Telefone: Eran Vodevoz. Gasto: Joela Egozi.

La Estraro bonvenigas la novan estraron, Asaf Ĥefec, kaj esprimas sian dankon al la antaŭaj membroj.

Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de Decembro 2016) – komentoj, kontrolo pri plenumado

Raporto: En la novjara renkontiĝo de esperantistoj en Germanio partoprenis 6 israelanoj – 4 familianoj Rimon, Gila kaj Amri Wandel. En sia prelego Amri varbis por la venonta IK. En la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) estis prezentitaj niaj novaj varoj. Ili ne vendiĝis, sed FEL prenis po unu ekz. por pluvendi. FEL prikalkulos la valoron kontraŭ libroj kiujn ELI prenis de FEL por pluvendado antaŭ kelkaj jaroj.

1. Proponoj de Joela

- a) Kelkaj el niaj anoj taksas, ke la elspezoj por la IK estas tro altaj. Ili petas pagi en du partoj – tiuj kiuj estas interesitaj en tio, devos mencii tion al Jael Ŝelaĥ en la formularo. Ili donos al ELI du ĉekojn po la duona sumo, unu tuj, la alian datigitan post unu monato. ELI pagos la tutan sumon al la hotelo anstataŭ ili. Nava devos pasigi la konto-numeron de la hotelo al Ŝlomo, por realigi tiujn pagojn. – *Unuanime akceptita!*
- b) Josi forpasis la 29-an de marto, antaŭ 4 jaroj. Ni projekcios pri Josi bildojn, prezentacion dum la IK, kun la ĉeesto de lia filo, Ŝauli (kiu jam aliĝis al al IK).
- c) Post ĉiu pago de membreco la paganto devus ricevi paperan kvitancon! Hodiaŭ tio ne okazas. Ŝlomo: mi povas sendi digitalan kvitancon (retpoŝte) al ĉiu bezonanto. Propono: venontfoje Jehoŝua kaj Ŝlomo klopodu doni kvitancojn samtempe kun la pago.

2. La 18-a Israela Kongreso, 2017, Aŝkelon (Amri)

- a) Kontrakto kun la hotelo: Amri sukcesis negoci pli malaltan koston por la salono (ĉ. 1100 NIS por du tagoj, inkl. trinkaĵojn – anstataŭ 2500 por la tuta tempo), kaj nuligon sen puno ĝis 30 tagoj antaŭ la evento. Ili cedis la antaŭan postulon, de listo de kreditartoj. La hotelo sendis modifitan kontrakton, kaj Amri jam resendis la subskribitan kaj stampitan kontrakton.
- b) Aliĝoj: Ĝis nun Jael ricevis mendojn por 6 ĉambroj de israelanoj (4x2+2x1), kaj Amri notis 4 ĉambrojn por eksterlandanoj.
- c) Ni devas trovi restoracion por ĵaŭdo vespere. Verŝajne estas en ĉe la apuda plaĝo. Nava esploros.

2/...



3. Eldonado: memorlibro pri Josi / IE-162 (Amri)

- a) La dua eldono de la Memorlibro estis presita je 50 ekz. kaj disdonita dum la ZV, neceso sendi al aliaj membroj. En la 100 pliaj presotaj eblas ankoraŭ korektetoj. Gabi: ne indas, ne restis menciindaj. Prezo por ELI 55 NIS anstataŭ 70, pro redukto de koloraj paĝoj.
- b) La IE-162 ankoraŭ ne pretas. Amri jam havas sufiĉan materialon, sed ne sufiĉan tempon.
- c) Redaktoro por IE – aktive serĉi kun promeso de la decidita rekompenco (1000 NIS/n-ro). Gabi, Jehoŝua: kio kun Benczik, Marĉek? Amri: la plej granda laboro estas varbado de materialo, ne la enpaĝigo. Pro tio - devas esti loka membro. Decido: ĝis troviĝos anstataŭanto (kun kiu Amri pretas labori paralele, por enigi lin al la laboro) – Amri daŭrigos kun rekompenco. – *Akceptita unuanime!*

4. Reklamado

- a) 1/4-paĝa anonco: Amri sendis, kaj devis koncizigi por la enpaĝigo. Sendita al la estaranoj.
- b) Ĉu Eran kontaktis kun "Lernu" kaj "Duolingo" rilate reklamojn? Eran telefone: mi provis kontakti ilin kelkfoje, ili ne respondis, mi daŭrigos la provojn.

5. Dratverejo (Jehoŝua)

Ĉu la luantoj akceptis la proponon fari fenestrojn por duona prezo? Komence ili protestis, poste silentis, - ni atendas ilian respondon. Eran: mi volis paroli kun la advokato pri TAMA38, sed li havis sanproblemojn hejme, kaj ne povis agi. Mi serĉis alian advokaton, sed lia propono estis trioble pli multekosta (dek mil sikloj kaj pli) – do ni restos ĉe la nuna advokato.

6. ELI-retejo (Dror)

Ni devas ĝisdatigi la IK-paĝon: aliĝilo, informilo. Pluraj: estu la lastaj protokoloj en la paĝaro, kun ligilo al ili – atingeblaj por la tuta ELI-anaro.

3/...



7. Disdono de taskoj en la Estraro

Dror Gaon: retejo

Matilda Landaŭ: programoj de eventoj

Eldad Salzman: kun-klubestro

Ŝlomo Ŝaĥar: kasisto, valorpaperoj de la Asocio

Jehoŝua Tilleman: vicprezidanto, kasisto, UEA-reprezentanto

Eran Vodevoz: komitatano pri MONA kaj KAEM, valorpaperoj de la Asocio,
kontaktoj kun amaskomunikiloj, juraj aferoj

Amri Wandel: prezidanto, komitatano A de UEA por Israelo, eksteraj rilatoj,
Israela Kongreso, Israela E-isto

Gabi Zeevi: protokolisto

Asaf Ĥefec: membro

Eksteraj kunlaborantoj

Miĥal Amir: kun-klubestrino

Joela Egozi: kontaktoj kun la membraro de la Asocio

La venonta kunsido: lunde, la 6-an de Februaro 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi